***cadon kondiĉe ke en la monumento, en ties dediĉ-tabulo aŭ en alia videbla loko, estu ia gravurita enskribo informante ke tiu monumento estis starigita dank' al la helpo de la Banka Konsorcio kun sidejo en Gijón. Tial ke tiu propono okazigis interkontraŭantajn opiniojn en la sino de la Organiza Komitato, oni kunvokis oficialan kunsidon de ĉiuj membroj de la Komitato por pridiskuti ekskluzive tiun aferon. La malkonsento kiun iuj membroj de la komitato esprimis pri tiu plano de la monumento estis je du tipoj: Unuflanke oni taksis ke ia monhelpo centrita ekskluzive sur la starigo de la monumento ne respondis al la realaj necesoj de la organizado de la Kongreso ĉar oni bezonas efektivan monon por aliaj kongresaj programeroj, kaj la antaŭkalkulata kosto de la monumento (250.000 pesetoj) multe preterpasis kaj kontrastis kun la monkvanto kiun oni povus dediĉi al aliaj pli interesaj aktoj de la Kongreso. Aliflanke, oni esprimis rezervojn je etika kaj morala karaktero al tio ke monumento dediĉita al la aŭtoro de la Internacia Lingvo povus utili kiel porĉiama propagando de la bankoj. Pro ĉio-ĉi, la plenkomitato decidis respondi al la ĉefaj bankoj mendante helpon senkompromise dediĉi ĝin al monumento, kaj kaze je starigo de tiu monumento senkompromise de la propagando kiun ili metis kiel kondiĉo. Tial ke ankaŭ ne estis respondo pri tiu afero, oni decidis tute forlasi ĝin.***



Filipo de Borbono, Princo de Asturio, prezidis la Honoran Komitaton de la Hispana Kongreso de Esperanto de la jaro 1979 en Gijón.

Sed estis aliaj institucioj pli malavaraj. La urbestraro de Gijón promesis financi “espiĉon” por la kongresanaro, kun spektaklo de folkloraj dancoj. Tiun promeson faris la antaŭa urbestrara korporacio, do post la balotado de la 3a de aprilo estis necese konsulti la novelektitan korporacion, kiu konfirmis la promeson. La Universitata Katedro Jovellanos, al kiu tiam nia E-grupo jam apartenis plenrajte kontribuis permesante al ni la uzadon de sia konstruaĵo kiel sidejo de la Kongreso: la granda salono por la solenaj aktoj de Malfermo kaj Fermo de la Kongreso kaj kelkaj aŭloj por prelegoj, kunsidoj kaj ceteraj kongresaj sesioj. La Rektoro de la Universitato de Oviedo konsentis la celebradon de akademia akto en la ejoj de tiu institucio, kaj la Urbestro de tiu urbo akceptis ricevi, la saman tagon, la kongresanaron en la Urbodomo.

Unu monaton antaŭ la kongreso estis aliĝintaj 253 personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. Kun **POLA ESPERANTO-TEATRO** oni interakordis ke du geaktoroj de tiu grupo ludos ĉe nia kongreso la teatran verkon **La Hipnoto**. La Ĝenerala Direktoro de la Poŝtservo konsentis ke dum tri el la tagoj de la Kongreso (la 18an, la 19an kaj 20an de julio) estu speciala afrank-stampilo en la kongresejo.

La reĝa Domo akceptis ke estu Prezidento de la Honora Komitato de la Kongreso Lia KronPrinca Moŝto Filipo de Borbono (Princo de Asturio). Aliaj membroj de tiu Honor-Komitato estis la Provinca Guberniestro, la Militista Guberniestro, la Ĉefepiskopo de la Diocezo, la Urbestroj de Gijón kaj Oviedo, la Rektoroj de la Universitato de Oviedo kaj de la Labora Universitato de Gijón, La Prezidento de la Katedro Jovellanos… kaj kromaj kelkaj gravaj personoj. Verdire, la kompono kaj la ekzisto mem de tiuj Honoraj Komitatoj estas nura protokolaĵo sen ia ajn efiko sur la Kongreso mem. Fakte, neniu aŭ preskaŭ neniu el ili ĉeestas eĉ se nur la solenajn kongresajn sesiojn.

Por la solena Malfermo de la Kongreso oni sendis invititon al aliaj aŭtoritatuloj, prezidantoj de kulturaj societoj, direktoroj de inform-medioj, de la Komerca Foiro, de la Asturia Enciklopedio, de la Asturia Centro de Havano…

La emblemo de la Kongreso, elektita de la Organiza Komitato, estis foto de la korto de la Labora Universitato tra la ĉefa portiko. La sama desegno estis uzita por la speciala poŝtmark-stampilo.

Kiel propagando de la Kongreso, **Boletin** de **HEF** publikigis iun artikolon verkitan de Alcibiades G. Meana. Por publike diskonigi la programon de la Kongreso estis kunvokita, la 19an de junio, gazetara konferenco al kiu oni invitis ĉiujn inform-mediojn, sed partoprenis en ĝi nur ***Radio-Oviedo*** kaj la ĵurnalo ***El Comercio*** de Gijón. La unua dissendis intervjuon kiun ili faris al la Prezidanto Santiago Mulas, kaj la ĵurnalo publikigis artikolon kun la programo de la Kongreso kune kun fotografaĵo de la Loka Organiza Komitato. Oni povas vidi tiun foton sur la sekva paĝo. Por la rilatoj kun la presaro, koncerne al la kongreso kaj al la E-Grupo ĝenerale, la Komitato nomumis iun Responsulon pri Informado; por tiu tasko estis elektita samideano Sacramento Collado.